# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k65.htm

1921

1986

HALE

SAT

2005

## La 2-a Kongreso virtuala, la 4-a de HALE: voĉdonu!

Nro 65a Januaro/marto 2005

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jaboneríás, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*


**ISSN 1697-6460**

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto*** *nº* ***2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: SAT kaj HALE flankataj de gravaj datoj.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Miguel Gutiérrez Adúriz,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***Sennaciulo***, de Kreŝimir Barkoviĉ,
6 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
7 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
8 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
9 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
10 ***Laŭte!***, de C. Baudé,
11 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
12 ***Juna Penso***, de Vinko Markov,
13 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
14 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
15 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



# Enhavo


Redaktore: eventoj ... 3
Informoj de la prezidanto ... 4
Sami Nair ... 5
Bonvolu ridi, sed ne tro! ... 6
Se vi ... 7
Klarigo kaj senkulpigo ... 7
Vetkuro de helikoj ... 8
Sopiro dum novjara nokto ... 10
Kongreso virtuala de Esperanto ... 11
    Ĉu HALE devas forlasi SATn? ... 12
    Tial oni restu en SAT ... 13
    Postkrizo kaj starigo de aliancoj ... 18
Kune danci ... 19
La Faraono ... 20


Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore Eventoj

*Pro tio, anstataŭe mi prikomentas la Kongreson de Ĉinio je paĝo 14ª, sed mi informos pli longe pri ĝi la venontan monaton.* Jen miaj lastaj vortoj en la ***Kajeroj*** de oktobro, vortoj, kiujn ni ne povas honori ĉifoje ĉar tiu temo ne plu aktualiĝas post la lastaj eventoj, kiuj okazis inter nia asocio kaj SAT.

Kiel vi ĉiuj scias, lastan jaron ni estis eksigitaj de la LEA-a Komitato de SAT. Aŭ almenaŭ tia estas la impreso de la Plenumkomitato kaj multaj anoj de SAT. Tamen, oni ne povas agnoski tion, ĉar mankis procedo deca fari tion, kaj sekve la ago estas nula je plena juro. Ni apelaciis kaj klarigis ĉion pri tiu problemo en la oficiala diskutejo de SAT, SAT-diskuto, zorgata de la Sekretario de la Ĝenerala Konsilantaro.

En tiu forumo estas pli ol 9 200 mesaĝoj nun, kio estas rekorda cifero en du jaroj, laŭ mia modesta sperto. Mi povas diri, ke ĝi respegulas tre bone la spiriton de SAT nuntempa, ĉar tie libere oni diras sian penson kaj senton, pri niaj komunaj temoj. Sed okazis aferon, kiu multe ŝokis min, kaj ankaŭ aliajn kamaradojn: La prezidanto de la Plenumkomitato, S-ro Jakvo Schram, demisiis de sia posteno kaj forlasis SATn kaj eĉ Esperanton! Tio kreis krizon en SAT, eĉ se li kvin tagojn poste revenis en la asocion. Nun estas kelkaj anoj de SAT, kiuj rebonvenigas lin kiel Prezidanton de la Plenumkomitato, sed aliaj anoj diras, ke li estis ekster SAT dum kvin tagoj, kaj sekve li ne plu estis SATano dum almenaŭ tri jaroj, kaj pro tio li ne plu povas esti Prezidanto ĝis tri jaroj pasos.




Alia evento estas, ke la Plenumkomitato de SAT sendis al mi sen-mansubskribitan dokumenton, per kiu ili eksigas min de SAT dum la jaro 2005 pro miaj diversaj reagoj al la fifamigaj asertoj de Jakvo Schram, kaj la reagoj al la maljusta eksigo de HALE kaj anstataŭigon de nia asocio per MSATeH defakta, eĉ senjura. Pro politikaj kialoj.

Mi memorigu, ke mi realiĝis al SAT, ĉar oni persvadis min: estas pli bone, ke la estraro de HALE estu SATanoj, kaj tiel la kunlaboro estos pli solida. Mi defendis dum multe da monatoj la rajton ne esti en SAT kaj tamen esti bona LEAano, sed finfine, pro objektivaj kialoj, mi rezignis pri mia argumento, kaj mi venis en SATn je la komenco de 2004. Mi povas diri, ke mi partoprenis en la diskutoj de la oficiala diskutolisto de SAT pli abunde kaj ofte ol iu ajn alia homo, kun la ĉeflinioj defendi la bonan nomon de HALE, liberesprimon kaj sendependiĝon de penso. Certe estas homoj, kiuj plendis pri kelkaj intervenoj miaj, sed mi ĉiam estis en limoj deca kaj frateca aŭ preskaŭ. Ĉu mia laboro tie estas pozitiva, ĉu ne, mi ne devas juĝi.

Analizinte la Statuton de SAT, mi trovis nenie la proceduron eksigi anon provizore, sed la plej proksima afero al tio estas je punkto 7-a. Sed tiu punkto rilatas al la Konflikto-Komisiono, kiu ne intervenis en la afero. Fakte, ne estis procezo antaŭ tiu decido, kaj pro tio mi denoncis ĝin kiel ne validan. Mi sendis la monon de mia kotizo je la lastaj tagoj de decembro, kune kun aserto en SAT-diskuton, ke mi rifuzas legitimecon al tiu decido de la Plenumkomitato de SAT, kaj mi daŭre konsideras min SATano, ĉar mi sufiĉe bone regas Esperanton kaj pagis la kotizon, kiuj estas la du kondiĉoj por esti SATano, kaj aldone mi ne estis subjekto de laŭstatuta procedo esti eksigita. Despli, ke ne estas kaŭzo por ke oni starigu kazon kontraŭ mi en SAT.

Sed mi ankoraŭ ne estis eksigita de la diskutolisto de SAT, kie mi daŭre estas aktiva.

Alia grava evento estas la 4-a Kongreso de HALE, 2-a virtuala, kiun ni priraportas kaj prezentas je la paĝo 11-a.

# Informoj de la prezidanto

Estimata gelegantoj de ***Kajero el la Sudo*** kaj estimataj geHALEanoj! En la lastaj semajnoj demisiis la Prezidanto de la Plenumkomitato de SAT, Sinjoro Jakvo Schram, kaj tio signifas ke la rilatoj inter SAT kaj HALE sanĝas, ĉar la nova Prezidanto ne devas havi la hipotekon de la krizo pri HALE.



Mi esperas, ke ni povos paroli kaj atingi interkonsenton kun la nova Prezidanto, kies nomon ni ankoraŭ ne konas. Ekde HALE ni deziras sukceson a la nova Prezidanto, sukceson por plibonigi SAT, sukceson por fari pli granda SATn, sukceson por negoci kun HALE. Tio estas mia deziro. Dum la lastaj semanoj mi parolis kun la redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo*** por plibonigi nian revuon, nian bultenon. Ni volas krei novajn spacojn kiel «la landojn de la ideoj» kie ni povas paroli pri la ideoj, malnovaj kaj novaj, kaj diskuti ilin.

Tio signifas pli da laboro por la redaktoro ĉar li devas serĉi aŭtorojn, kiu volas skribi por ***Kajero el la Sudo***.

Ni volas praktiki niajn ideojn pri la liberpenso, tio signifas, ke povas skribi en ***Kajero el la Sudo*** ankaŭ personoj, kiuj ne estas SATanoj aŭ HALEanoj, ĉar ni volas atingi altan nivelon de ideoj por nia bulteno.

La bulteno ne estas bulteno de polemiko inter SAT kaj HALE, ne estas bulteno de novaĵoj de la mondo esperantista, la bulteno devas atingi altanivelon kaj la laboro, kiun ni devas fari, estas inter la esperantistoj, kaj precipe inter la ne esperantistoj kaj precipe inter la laboristoj en niaj medioj.

Kiel atingi la laboristajn mediojn kiam la bulteno estas gazeto de la polemiko inter SAT kaj HALE? Ne eblas, nia laboro estas atingi la laboristajn mediojn, kaj la mondon ne esperantistan, kaj por tio nia bulteno devas ŝanĝi, pli kaj pli, por atingi altanivelon de bulteno.

La esperantista movado bezonas renoviĝi ĉar la libroj, la bultenoj, la revuoj, estas por esperantistoj, ne por ne-esperantistoj, Tio signifas ke ni devas labori en medioj esperantistaj kaj ankaŭ en medioj ne esperantistaj,

Aŭ ni faru revuon, gazeton en nacia lingvo, aŭ ni faru revuon en du lingvoj, aŭ ni faru revuon en Esperanto kaj en nacia lingvo.

Tio estas strategio, kiun ni devas pensi, aliflanke ni jam havas la duan kongreson virtualan, pri kiu nia redaktoro parolos.

*Juan Antonio*

# La landoj de la ideoj: Sami Nair.

Kiam mi studis en universitato, dum la epoko de Franko, mi konis kaj legis la pensojn de Sami Nair, ĉar li verkis unu el miaj devigataj legolibroj.

Post legi lian artikolon publikigitan en la ĵurnalo ***El País*** (la lando), mi konsentis kun lia ekzameno pri la balotado de 1996,kiam Aznar venkis la balotadon per malplej granda parto: li diris, ke la hispana popolo apogis la Partion Popolan, sed ĝi malfidis al ties demokrataj intencoj, kaj pro tio la popolo ne donis la plajgrandan majoritaton al tiu partio.



Kiam mi legis en la ĵurnalo de Murcia nomita ***La verdad*** (la vero), ke Sami Nair prelegas en la urbo, mi ĉeestis lian prelegon. La prelegejo estis plenplena da aŭskultuantoj, kaj multaj el ili estis laŭ koridoro. Iliaj aĝoj estis diversaj, de maljuneco al juneco, aŭskultnatoj estis kun kravato, kun toĉemizoj…, diverskoloraj.

Sami Nair diris tre klarajn ideojn: ke Usono regas la ilojn de informado, ke ni estas en informomilito, kaj pro tio Usono volas regi la pensojn de la civitanoj de la mondo. Pri la milito de Irako, li diris, ke Usono perdis ĝin je la momento en kiu aperis urbo, Faluja, kiu volis iĝi la *Novan Ŝtalingradon*. Por Usono, regi la rimedojn de la benzinoproduktado, praktiki la deficiton, kaj uzadi la ŝparon de la mondo, estas sia propra supervivado. La unuaj ideoj de Sami Amir ne estas novaj, ĉar ĉiu ŝtato, kiu regis la mondon, volis kontroli la ilon de la informado: la romianoj uzis pontojn en sia tempo, kaj ŝoseoj romianaj, revoluciaj inventoj tiutempe, ĉar tiel sufiĉe pli rapide ol ĝis tiam oni povis atingi Francion, Hispanion, ceterajn partojn de Italion. Tiel romianoj kontrolis informadon, ili sciis kio okazis en la imperio pli frue ol antaŭe.

Dum la lasta jarcento, Ŝtalino estis la mastro de la rego de iloj de informado, kaj Hitlero estis lernanto, kiu superis sian mastron, kiam nazismo proklamis, ke *la grandaj mensogoj diritaj multfoje iĝas grandajn verojn*. Kiam en tiu ĉi jarcento Japanio estos la ŝtato, kiu kontrolos la mondon, Japanio regos la ilojn de la informado.

Mi ne zorgas pri tiu situacio se mi havas propran ilon por komuniki, kaj mi povas ricevi novaĵon per sendependaj iloj, kaj en tiu ĉi momento la reto estas la iloj de la novaĵoj sendependaj.

Ĉu vere Usono perdis la militon en Irako? Mi ankoraŭ kredas, ke ne: estas vere, ke Usono eraris pri la popolo de Irako, ĉar ĝi taksis ĝin kiel okcidentanojn, kaj ne kiel irakanojn. Sed mi kredos, ke Usono malvenkis la militon, se Irako iĝos islaman ŝtaton per balotado.

Ĉu Usono malvenkis la militon en Afganio? Afganio havas malfortan demokration, sed demokratio vera, eĉ se rezistado ankoraŭ vivas.

Pri la deficito de Usono, mi povas respondi per artikolo, kiu aperis en la ĵurnalo ***El País*** la duan de januaro de 2005, kies titolo diris: La kreskado de la mondo dependas el dolaro: la dolaro estas malalta kaj tial la ekonomia mondo povas kreski.

Finfine, tio, ke Usono volas regi la benzonproduktadon de la mondo, ne estas nova ideo. Hispanio volis regi la oron kaj arĝenton. Se Usono volas regi la benzinproduktadon, la problemo estas por Eŭropo, kiu ankoraŭ ne apogas forte ekologiajn energiojn, kiel sunan aŭ blovan. Ĉu Usono povos regi la Sunon? Mi kredas, ke ankoraŭ ne.

*Johano Cabezos*

# Bonvolu ridi..., sed ne tro!

Ulo venis kun belulino en juvelvendejon, kaj ili kune elektis juvelon, kiu kostas 1 200 eŭrojn. Pagante, la viro plenumis ĉekon por tiu kvanto, sed la vendisto diris, ke li ne povas akcepti, ĉar estas la unua fojo, kiam li venis en la vendejon. La viro diris «Mi vidas, ke vi zorgas pri tio, ke eble ne estas mono en mia konto. Sed mi ne deziras kaŭzi problemojn al vi. Do, ni faru tion: ĉar hodiaŭ estas vendredo kaj la banko jam fermis, vi konservu kaj la ĉekon kaj la juvelon. Lundon frumatene, kiam vi jam kasigis la ĉekon, vi sendu la juvelon al la domo de la sinjorino. Ĉu bone?» La vendisto sopiras trankvila.

Sed lundon, la vendisto telefonas la viron konstatinte, ke ne estas mono en la konto, kaj ricevas tiun ĉi respondon: «Ne gravas, kamarado, vi jam povas rompi la ĉekon: mi jam amindumis kun la knabino!»

## Jesuo volas detrui SATn!

Mi devas diri, unue, ke mi ne partoprenas aktive en SAT-diskuto, aŭ en alia diskutejo, ĉar mi ne havas sufiĉe da tempo por partopreni, kaj kiel diras la samideano Stano, *mi havas aliajn respondecojn.*

Mi ne memoras kie mi legis la frazon, ke *Jesuo volas detrui SATn*, kaj mi ne scias kiu samideano skribis tiun ĉi frazon.

Mi ridis, kiam mil iegis la frazon, ĉar nek Ŝtalino nek Hitlero povis detrui SATn, kaj nun okazas, ke Jesuo, profesoro pri la angla, povas detrui SATn.

La frazo signifas malafablon al SATAnoj. Kial?

SAT estas formata de personoj, kiuj havas sangon, ideojn, emociojn; la granda valoro de SAT estas la personoj, kiuj sentas sin kiel SATanojn.

Ŝtalino, per sia polico de teroro kaj siaj koncentrejoj, Hitlero kun siaj koncentrejoj kaj ekstermejoj kaj polico de teroro, kiam ĵurnaloj kaj radiostacioj ne povis mortigi SATn. Kial? La respondo estas facila: ĉu povas morti ideoj, kiam la ideoj estas en la koroj de SATanoj?

Tiu frazo supozas, ke SAT estas la Plenumkomitato, ke SAT estas ***Sennaciulo***, ke SAT estas la kongresoj; sed el mia vidpunkto, SAT etsas la SATanoj,kaj la Plenumkomitato, la bulteno, la kongresoj, estas la vestaĵoj de la SATanoj, sed se ne ekzistas SATanoj, ne ekzistas Plenumkomitato, *Sennaciulo* aŭ kongresoj.

Marteno Bustin rakontis iam al mi, ke dum la Dua Mondmilito franca esperantisto kaj SATano povis vivi en koncentrejo ĉar estis germana policisto tie, kiu estis ankaŭ esperantisto kaj SATano. Hitlero fiaskis kontraŭ du SATanoj, kiam la SAT organizo estis malforta. Hitlero kun siaj tankoj, aviadiloj, SS, armeo, fiaskis antaŭ du SATanoj: unu en la koncentrejo, franca, alia ekster la koncentrejo, germana. Ambaŭ faris SATn.

Tiu frazo malsufiĉe bone estimas la SATanojn kaj La Plenumkomitaton, ***Sennaciulon***, ĉar ĝi signifas, ke nur unu persono povas detrui SATn. Eĉ se Jesuo estas la nomo de la filo de Dio, oni povas ripozu trankvile, ĉar tia Jesuo, nia Jesuo, estas atea, kaj sekve ne la filo de Dio.

Ni povas sufiĉe trankvile ripozi, ĉar Jesuo ne estas la filo de Dio, li ne havas policon de teroro, li ne havas tankojn, aŭ koncentrejon aŭ ekstermejon, nek SSn, sed nur argumentojn, kiuj ne estas mortigaj krom al aliaj argumentoj ne sufiĉe bonaj.

La aŭtoro de la frazo havas timon antaŭ Jesuo, kaj mi ĉiam pensas, ke mi nur havas timon kiam mia kontraŭanto havas pafilon, sed se li havas nur argumentojn, mi ankaŭ povas produkti kontraŭargumentojn, kiuj povas esti eĉ pli bonaj ol tiuj liaj.

*Johano*

# Se vi

estas esperantisto kaj vi loĝas proksime de Mursjo, sciu, ke ni serĉas vin.

Sinjoro Jozefo Pina laste lanĉis ĉi tiun iniciaton, ĉar estas tiom multe da esperantistoj proksime de ni, kiuj ankoraŭ ne trovis nin, kaj ni kredas, ke unuiĝo faras forton, kaj ankaŭ pro tio, ke ni bezonas vin, ne nur vian forton, kiun vi eble ne povas pruntedoni al ni, sed ankaŭ vian kuraĝigon, vian estimon kaj eĉ amikajn vortojn, ni de ĉi tie invitas vin renkonti nin en Kafejo *Candela* lunde je la 20:00 horo, kie vi povas trovi nin escepte de la monatoj de julio kaj aŭgusto, pro feriaj kialoj.




# Klarigo kaj senkulpigo

Mi ĵus ricevis retmesaĝon de kamarado Michel Duc Goninaz, kun tiu ĉi protesto:

*Ĵus leginte la artikolon «La problemo pri SAT» en la julia numero de **Kajeroj el la Sudo** (reta eldono) mi kun miro rimarkis la jenajn frazojn, en kiuj mia nomo estas dufoje menciita sub iom kripla formo:*

***M. Duc Goninaz** certe mensogas, kiam li asertas, ke en **Kajeroj el la Sudo** aperis artikoloj kontraŭ SAT. [...]*

***Mi pravigas nenion** pro demokrateco ktp, kiel li diras, sed nur defendas la rajton de ĉiu homo esprimi sian penson libere. Se tio estas kontraŭ la SAT maniero, kaj preter la tolerlimo de SAT, mi ankoraŭ ne diris tion. Duc Doninaz diris.*

*Tiu aserto estas flanke de la aŭtoro de tiu artikolo —neklara estas lia identeco— grava akuzo, kiun neniu fakto povas pravigi, kaj la akuzon pri mensogo mi devas bedaŭrinde turni al li.*

Mi devas agnoski, ke Michel Duc Goninaz pravas, kaj mi per ĉi tio pardonpentas al li publike, ĉar mia hasta legado de tiu ĝenanta afero en bulteno de SAT erarigis min. La teksto ne estas tre klara en ***Sennaciulo***, kie tiu tikla problemo devus esti traktita pli takte. Tio ne estas, evidente, kulpo de SAT, sed nur de la aŭtoroj de tiu artikolo, Grazina Opulskiene kaj Kreŝimir Barkoviĉ.

Kamarado Doniniaz finas sian mesaĝon per tiuj konstruigaj vortoj:

*Mi ne postulas, kiel la aŭtoro, «publikan pardonpeton», sed mi opinias, ke estus dece publikigi malkonfirmon de tiuj asertoj en venonta numero de **Kajeroj el la Sudo**.*

Tamen, mi denove pardonpetas, ĉar tiun mispaŝon mi neniam devus fari.

*Jesuo de las Heras*

# Vetkuro de Helikoj,

## aŭ kiel klerigi sin plej rapide.



Helikoj estas afablaj bestoj. Ili manĝas laktukon, lakton kaj tukojn, ili neniam fekas sur razenoj, kaj krome estas hermafroditoj. Pro tio, ke ili ne ciumas inter si, ili ne konas naciismajn problemojn, kaj tute ne suferas pro la kapitalisma posedo de sia konko. Helikoj estas la plej sekvindaj ekzemploj, ĉar ili absolute fajfas pri landlimoj, kaj ankaŭ ne vivas en sakoj funde de la maro. Ili ne spertas la akrajn dividojn inter dekstro kaj maldekstro, faŝismo kaj komunismo, raŭmismo kaj finvenkismo aŭ aliaj same senbazaj ismoj, ĉar por ili la supo ĉiam estas malvarma kaj malneta.

Tamen tio ne estas la kerno de mia drupa argumentado. Ĉiuj homoj rajtas vivi kaj paroli, ĉar la statuto de SAT estas respektinda dokumento, ĉefe por membroj de tiu asocio. Kiam orangôo iĝas griza, oni ne timu karesi kuniklon per duonputra piro. Kaj jen alvenas la ĉefa punkto en mia rakonto. Kial organizi vetkuradon inter helikoj? Fakto estas, ke Esperanto estas facila lingvo. Sed oni ne povas nei, ke puloj estas insektoj, dum duflankuloj ne ĉiam estas prabuŝuloj. Tio kompreneble ne koncernas la ĥordulojn kaj la ananasojn, sed mi petas pro tio ilian plej sinceran pardonon. Nenio povas forpreni de mi la amikan manon, kiun prezentas al mi tiu polvokovrita ŝranko. Pri komputiloj kaj azenoj ni ne tro longe teoriumu, ĉar tio montriĝas absolute senutila kaj eĉ ĝena por tiuj, kiuj prave opinias, ke ekzistas pli gravaj temoj por trakti. Samtempe en la leterkesto, foje okazas ke ni ricevas nepetitajn reklamojn, sed tio estas la ĉefa kulpo de la hispana kapitalismo. Fakte mi eraras, kaj esprimiĝas kiel reakcia burĝa naciisto uzante tiun esprimon, ĉar ĉiuj scias, ke barbo ne havas fadenojn. Tial mi plej humile pardonpetas al ĉiuj virusoj kaj bakterioj, kiujn mi nevole insultis. Ili certu, ke mi estonte provos rilati al ili plej kamaradece, sen neniam peti monan kompenson por tio.


Alia grava punkto estas, ke neniu ĝis nun klare pruvis, ke Jesuo estas la filo de Dio. Ja en tiu tempo ne ekzistis DNA analizo, kaj la fakto, ke vulpoj frandas maizon ne devas forgesigi, ke tritiko ne estas hordeo. Tamen, por ne tro tordi mian argumentadon, mi substreku, ke kadukiĝo ne ĉiam estas signo de supemo, dum la supereco de hipopotamo kompare al boltilo estas evidenta laŭ estetika vidpunkto, kaj ankaŭ laŭ la plej elementaj reguloj de moralo kaj dececo. Mi ne aŭdacus kredi, ke nur mi ĝis nun alvenis al tiu konkludo, kvankam estas certe, ke tio estas super la komprenkapablo de kvinjara infano. Oni ja ne rajtas senbaze aserti, ke maraj kolbasoj estas malpli progresemaj ol groenlandaj strutoj. Tio ankaŭ ne signifas, ke la limo de esprimlibereco troviĝas inter la klavaro de komputilo kaj la kravato de usona pulo, sed tio tute ne respondas al la kutima difino pri la temo, kaj pro tio mi ne timas daŭrigi la argumentadon. Estas ankaŭ vere, ke kameloj jam delonge ne plu vivas en Francio, kvankam historiaj pruvoj mankas por scii, ĉu ili malaperis el tio antaŭ ol post la lastaj dinosaŭroj. Ja neniu el ni troviĝis tie por vidi, kaj krome la falsado de arĥivoj estas tute ofta en la dokumentejoj, kiujn prizorgas fadenvermoj, pro la simpla fakto ke tiuj ĉi ĝis nun ne havis la eblecon legi la usonan konstitucion.

Denove mi volas substreki, ke oni ne miskomprenu min. Ĉiuj anoj de HALE ĝuas mian plej grandan respekton. Mi ne dubas, ke kelkaj ne plene komprenos ĉiujn fajnaĵojn de mia argumentado, sed mi restas je la dispono de ĉiuj por klarigi pliajn malkarajn punktojn. Oni ne forgesu, ke ĉiu aserto meritas longan pripensadon, kaj devas esti refutita

per vortoj kaj ne per la sensenca argumento, ke tio estas nekomprenebla ĵargono. Ja tio klare signifus, ke esprimlibereco havas limojn, kaj tion mi nepre ne povas akcepti. Nenio estas al mi pli kara ol la fakto, ke ĉiu rajtu senbremse esprimi sin pri diversaj temoj. Do, tio ankaŭ pravigas la aserton, ke oni tute ne rajtas uzi perforton por kuirigi nudelojn. Tio estus absurda sensencaĵo, kiu nur ebligus pluan prosperon de dogmoj, kiujn ni ĉiuj devas plej firme kaj plej draste kontraŭbatali, ĉar dogmoj signifas la malon de esprimlibereco.

Mi ne volus konkludi tamen sen reveni je la ĉefa punkto de tiu ĉi artikolo. Ja, kial okazas vetkuroj de helikoj ? La demando estas malfacile respondebla, ĉar dokumentoj pri tiu temo estas ja malabundaj. Tiu temo ĉiam estis cenzurita de ĉiuj diktatoraj reĝimoj ĝuste pro la fakto, ke ĝi estas unu el la ĉefaj ĝermoj de esprimlibereco. Kaj por estingi la ĝermon rekte en la skatolo, nenio estas plej efika ol la sesa kruro de araneo, ĝuste pro tio, ke ĝi rilatas tute neŭtrale al la temo, kaj tial subtenas absolute neniun dogmon. Ja dogmoj estas vere danĝeraj por la omaroj, kaj pravigas ankaŭ la skismemon de salikokoj kiam temas pri kritikado de historiaj manipuloj. Oni ja ne rajtas forgesi, ke la plej grandan konfuzon produktis la krima subteno de ĉiuj diktatoroj fare de la tria leĝo de Avogadro. Mi ne citas tiun fakton por nebuligi la debaton, kiu ja estas jam sufiĉe densa kaj pripensiga, sed ankaŭ pro la fakto ke mi ĝis nun neniam renkontis senharan mamuton, kiu kapablus raporti al mi precize kaj supertendence pri la evento. Ja estas nekontestebla fakto (pri tio almenaŭ ĉiu konsentas, eĉ se denove, estas tre malfacile ĉerpi precizajn informojn pri tio pro akra cenzurado), sed nun estas absolute certe, ke kamelo havas kvar krurojn, almenaŭ ĝis kiam oni fortranĉos unu el ili, kio povas okazi en kelkaj ekstremaj kazoj, sed tamen estas malkonsilinda, kaj malfavora al la estigo de pozitiva serena debato.

Nu, eble venas nun la tempo por konkludi, kvankam post unu estas du, kaj post tri estas kvar, dum ses kaj du neniam estas pli ol ok. Tio konsistigas la ĉefan punkton de mia argumentado. Eĉ se ne eblas nei tiel simplan aferon, okazas, ke je la nomo de mi ne scias kiu dogmo, kelkaj kredas sin pretaj ne esprimi tion. Evidente mi ne estas certa, ke tiu argumentado plene konvinkos vin. Tamen mi certas, ke kun ioma bonvolemo vi sukcesos almenaŭ kompreni, kion mi celis. Tio jam estus granda paŝo, ĉar el provo kompreni la aliaj venas toleremo kaj esprimlibereco, kiuj estas la plej efikaj armiloj kontraŭ dogmoj kaj malamo. Tamen oni ne miskomprenu la vorton armilo. Mi tute ne aprobas ian ajn formon de perforto, kaj absolute senrezerve kondamnas ĉiujn militojn, eĉ se montriĝas, ke kelkaj el ili estas neeviteblaj, pro tio ke foje sakemuloj ne akceptas, ke aliaj homoj malsamopinias kaj prezentas argumentojn al ili ne konataj. Tio estas la plej certa paŝo al maldemokrateco, kaj tion mi absolute kondamnas, ĉar manko de esprimlibereco estas la unua paŝo al faŝismo, kiun ni nepre ĉiuj devas kondamni per raciaj argumentoj, ĉar infana supraĵa ignoro de la temo povus provoki gravajn problemojn.



Ĉu utilas aldoni ion ? Evidente jes, se tio povas alporti ioman klarecon al la debato. Pro tio, ke mi estas tre ĝentila kaj afabla homo, mi neniam rifuzos doni manon al amiko, eĉ se tiu ĉi foje havas opiniojn kontraŭajn al la miaj? Tio certe estas la kerno de esprimlibereco kaj de kontraŭdogmisma supertendenceco, tial mi sincere ĝojas pri la fakto, ke troviĝas komprenemaj homoj por subteni miaj asertoj. Evidente la anasidoj rajtas plu naĝi meze de la lago, sed kreskante ili fariĝos plenkreskaj birdoj, kapablaj flugi memstare super la tumulta maro de dogmoj el la ĉiutaga mondo. Per tiu novakirita matureco ili certe montros la vojon al ni, kaj mi tute ne dubas, ke eĉ se kelkaj ne bone komprenis miajn vortojn, neniu insultos min, kaj ĉiuj provos trankvile diskuti ĉiujn miajn asertojn per pruvitaj faktoj, kaj ne per malestimaj bombastaj vortoj, kiuj nur pruvas ilian maltoleremon kaj nekomprenemon.

Mi plej sincere restas je la dispono de la legantoj de ***Kajeroj el la Sudo***, kiu emos havi pli detalajn informojn pri la temo. Diskuto ĉiam eblas, kaj instruas la kleriĝemajn homojn. Tial ĉiujn komentojn mi pridankos, eĉ se malfavoraj.

*Vinko MARKOV*

# Sopiro dum novjara nokto

Grandan dankon por viaj bondeziroj, kiujn mi el tuta koro reciprokas.

Eble al vi estos interese, kiuj pensoj venis al mia kapo dum la Nov-jara nokto.

Nun dum kelkaj tagoj finnoj parolas nur pri katastrofo en Asio. En kelkaj turistaj lokoj estas multe da finnoj, pli ol 3000. Nun ili parolas ke estas preskaŭ 300 kies sorto estas tute nekonata. Almenaŭ du finnoj mortis. Jes, vi pravas, la tuta mondo funebras kaj kondolencas. Ja, la plej granda katastrofo dum lastjarcenta historio. Multaj ŝtatoj sendas helpojn, ankaŭ la nia.

En nia lando vivo fluas kutime, kiel ĉe vi?

Sed en nia lando post renverso de la 1993-a jaro la vivo tute ŝanĝiĝis.

Nur nun ni komprenis, ke tiam, dum la soveta potenco, ni vivis kvazaŭ en komunismo: la studoj, senpage; la kuracado, senpage; la loĝejoj, tre malmultekostaj, preskaŭ senpagaj. La sanatorioj, oni pagis maksimume 10% de la kosto: ĉion ceteran rekompencis sindikato. Kaj tiel plu, pri ĉiuj sferoj de la vivo tiama. Kaj nun? Areto da banditoj, rabistoj kaj prizonuloj privatigis uzinojn, vendejojn, hospitalojn, minejojn kaj ceterajn riĉaĵojn, apartenantajn tiam al la popolo, kaj ĉerpas riĉaĵojn al siaj poŝoj.

En kiuj kapitalismaj landoj dum deko da jaroj aperis centoj da miliarduloj?

Sed la popolo suferas. Ĉirkaŭ 90% da loĝantaro vivas sub nivelo de kontentiga vivo.

La eksa plej potenca ŝtato de la mondo, kiun ne kapablis venki Hitlero aŭ Napoleono, nun subiĝas al ordonoj de Usono kaj NATO kaj niaj gvidantoj kune kun la prezidento lekas ŝuojn de BUSH kaj ties aliancoj.

Usono kaj NATO faras ĉion por malpacigi niajn iam amikajn popolojn kaj disfaligis Sovetunion, nun ili dauras sian malican politikon kaj poiome malpacigas popolojn de la eksaj sovetaj respublikoj, rarante tie jen rozan, jen oranĝan revoluciojn.

Tion vi jam bone vidas sur ekzemplo de Kartvelio kaj laste Ukrajnio.

Kiu el eksaj sovetaj respublikoj estos vica?

La nuna prezidento, kiam venis al sia posteno antaŭ kvin jaroj, ĵuris, ke li ĉesigos senhontan militon en Ĉeĉnio (Iĉkerio), sed kio okazis fakte? Tiu eta popoleto, kiun siatempe Stalin dum unu nokto translokigis en Siberion, nun minacas kaj terorismas al la tuta Rusio, estante miloble malpli granda teritorie kaj popole!

Ĉu tio estas normala politiko de la Rusia prezidento?

Kaj tiel en ĉiuj sferoj de la vivo: la agrikulturo disfalita tiom, ke oni aĉetas tiel nomatajn kokinajn «piedetojn de Bush», anstataŭ kreskigi proprajn kokojn!

Kaj la industrio estas tiom disfaligita dum deko da jaroj, ke nun, se ŝanĝi denove registaron al la sovetia, oni bezonos ne malpli ol kvindek jarojn por revenigi Rusion al potenco de naŭdeka jaro.

Mi ne vane parolas pri «piedetoj de Bush». Ja la jaro 2005 laŭ la orientaj kalendaroj estas jaro de koko. Kaj eble tiu kuraĝa vir-birdo tiom kuraĝigos niajn landajn virojn, ke ili denove prenos en la manojn forkegojn kaj hakilojn kaj revenigos al si tiujn riĉajojn, kiujn la komunistoj de la jaro 1917 donacis al la popolo kaj kiujn areto da friponoj alproprigis en 1993-a? Jen kiuj pensoj venis al mia kapo ĉi nokte dum veno de la Nova Jaro.

Kun salutoj,

*Vladimir Bespalov*

# Kongreso Virtuala de Esperanto, organizata de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

Kamarado aŭ samideano, kiu legas min:

Se vi aŭ ci deziras partopreni, bonvolu sendi mesaĝon al jesuo@ono.com, kaj vi estos en la Kongresa Libro (vi ricevos Kongresan nombron).

Bonvenigata en nian Duan Virtualan Kongreson de HALE, (la Kvara Kongreso de HALE). Ni komencis ĉijare kun malfruo, sed ni decidis diskonigi la aferon unue dum la festumado de la Tago de Zamenhof, en Alikanto, celante pli da partopreno ol lastan jaron.



La esperantistoj de Alikanto kaj Mursjo renkontis je la restoracio *Capitol* por manĝante festumi la 145-an Tagon de Zamenhof la 19-an de decembro, kvankam la vera datreveno de nia fondinto estis la 15-an. Dum nia festumado ni disdonis la Premion Zamenhof de la jaro 2004, kiu estis la artikolo *La tago plej longa*, de Olga López, kiun ni publikigis je la numero 62-a de nia bulteno.

La temo de nia kongreso ĉi jare estas:

## SAT-HALE, kiel rilati?


Mi komprenas, ke la temo estas tikla kaj eble neatendita, sed kelkaj aferoj okazis laste kaj delonge inter ni kaj nia patrina asocio, kaj pro tio kelkaj kamaradoj sentas, ke ion oni devas fari.

Vi ankaŭ pensu kaj reagu al la diversaj proponoj, kiujn oni faros ĉi tie. Ankaŭ vi povas prelegi pri tiu temo, se vi sendas al mi vian prelegon.

Suben vi povas legi ĉi tie diversajn prelegojn, kiuj subtenas diferencajn vidpunktojn pri tiu temo. Oni scias, ke antaŭ nelonge la LEAo Komitato de SAT komunikis nin, ke ni *preferinde ne estu en la LEA komitato de SAT kaj ne rilatu al tiu asocio*. Ni scias, kaj tiel ni sciigis SATn, ke mankas jura procedo por tion fari, ĉar la spirito de la fondintoj de SAT kaj kompilintoj de ties Statuto ne antaŭvidis tiun kazon, ke oni ne plu volos LEAon en SAT, sed tute kontraŭe, kiel atingi, ke novaj LEAoj kreiĝos. Sekve, male al la sinteno de ili esprimita, ni ankoraŭ estas LEAo, kaj tio prezentas juran problemon por la Sennacieca Asocio Tutmonda, laŭ la agoj de ĝia nuna Plenumkomitato.

Sekve, la estraro de HALE parolis pri tiu problemo, kiu venas, el la konstato de

la fakto, ke oni ne deziras, ke ni estu tie, en la sino de SAT, kiu estas nia natura loko esti. Ni venis al konkludo, ke baze estas tri vidpuntoj:




1. Ni <u>forlasu</u> SATn.
2. Ni <u>restu</u> en SAT.
3. Ni <u>renegocu</u> nian restadon en SAT.

Tiucele, ni prezentas al vi tri prelegojn, subtenante la ĵus cititajn vidpunktojn:

***1. Ĉu HALE devas forlasi SATn?,*** de nia Prezidanto, .

***2. Tial ni devas resti ĉe la sino de SAT***, de Redaktoro Jesuo de las Heras.

***3 Postkrizo kaj starigo de aliancoj***, de Sekretario Jozefo Pina Tuells.

Ĉiuj tri decidoj estas tre gravaj, kaj pro tio ni estraranoj decidis, ke ni referendumu pri tio, kion ni faros. Sekve, ni elektis tiun gravan temon por nia dua kongreso virtuala de HALE, entute kvara, kaj prezenti al vi tra intereto de nun, kaj per nia bulteno al la anoj, kiuj ne havas retaliron. Vi havas ĝis la fino de la monato de marto por sciigi al ni vian voĉdonon, kaj ni pristudos la balotadon kaj informos al vi pri la fina decido de HALE per interreto kaj per la aprila numero de ***Kajeroj el la Sudo***, kie ni ankaŭ analizos la tutan problemon.

Ni aldonu nur, ke por voĉdoni, vi nur bezonas premi sur la ligon sub la subskribo de la preleganto aŭ sendi leteron al la redaktoro aŭ al la prezidanto de HALE.

Altestime salutas,

*Jesuo de las Heras*
*(nome de la estraro de HALE)*

# Ĉu HALE devas forlasi SAT?

Estimataj gekongresanoj: La demando kiun ni devas fari estas Ĉu HALE devas forlasi SAT? Ene de HALE ekzistas tri pensoj: samideanoj kiuj pensas, ke ni devas esti en SAT, samideanoj, kiuj pensas, ke HALE devas esti en fakoj de SAT, kaj samideanoj, kiu pensas ke HALE devas forlasi SAT, eĉ samideanoj,kiu pensas ke HALE devas ŝanĝi sian nomon ...

Kiel Prezidanto mia koro suferas kiam SAT, progresema Asocio, agadas kontraŭ HALE kiel malprogresema Asocio, kiam SAT forpelis HALEn, kontrauleĝe.

En la lasta tagoj estis revolucio en SAT, kiam Prezidanto Jakvo komunikis, ke li forlasis SATn, ke li ĉesis kiel Prezidanto.

En tiu ĉi momento ekzistas la eblecoj, ke HALE kaj SAT povas daŭrigi la paroladon

inter si, ke ili povas kunlabori, kaj la milito inter HALE kaj SAT estus paĝo de la - Historio. Kiam mi pensas en tiuj ĉi eblecoj, mi pensas ke HALE devas esti en SAT.




Sed se la nova Prezidanto de SAT havus la samajn ideojn kiel Jakvo kontraŭ HALE, tuj ni havus du vojojn : unue ni povas daŭrigi la polemikon kun SAT (Ĉu polemiko estas bona por ambaŭ asocioj?), aŭ forlasi SATn (Ĉu estas bone por SAT, ke HALE forlasu ĝin?)

En tiu ĉi kongreso la gekongresanoj devas paroli, argumenti kion ni devas fari.

En la lasta semajno mi, kiel Prezidanto de HALE, sendis leteron al P.K., en kiu mi diris «kun la nova situacio de la demisio de Jakvo kaj ĉar SAT ne havas Prezidanton, HALE ne volas ke la nova Prezidanto havu la hipotekon pri HALE, tial ĉi HALE proponas al SAT:

1 Kion povas fari SAT por HALE?

2 Kion povas fari HALE por SAT?


3 Kion povas fari ambaŭ asocioj, SAT kaj HALE, por Esperanto en la laborista medioj.?»

Mi atendas ke la P.K. respondos kaj ni povas fari agadon kune en la laboristaj medioj.

La gekongresanoj povas decidi kion fari se SAT ne respondus.

Mi atendas viajn proponojn, vian paroladon kaj vian opinion.

*Juan Antonio Cabezos Martínez*
*Prezidanto de HALE*



## Tial oni restu en SAT

Nun oni petas nin, ke ni decidu ĉu ni daŭrigu nian rilaton al SAT, ĉu ni ĉesu ĝin.

Mi provos konvinki, ke nia loko estas ĉe SAT, kie ni estis de nia naskiĝo kiel asocio, kaj kie ni ankoraŭ kusas, eĉ se kelkaj misgvidataj SATanoj kredas, ke deziro – eĉ se plejmulta— igas leĝon sen taŭga procedo.

Kiam ni komencis ekzisti, je 1986, ni komencis kiel LEAo. Kelkaj SATanoj loĝante en Hispanio kunvenis, kaj proponis, ke oni kreu hispanan Laboristan Espe-



Fama bildo de Eŭĝen' Delakrŭa' reprezentas
Liberecon venkante la reakciulojn.
Sed mi ne ŝatas tion, kion ŝi havas je siaj piedoj:
Venko sanga estas malvenko, laŭ mi,
kaj ankaŭ libereco estu por ĉiuj.

ranto-Asocion, rilatantan al la Sennacieca Asocio Tutmonda per la Konvencio de Gotemburgo de 1928.

De tiam ni laboris pri niaj celoj, tiom multe, kiel ni povis, kaj ni daŭre faras ĝin: ni prelegis, ni instruis Esperanton en la diversaj medioj, kie ni povis, inkluzivante la Ateneo de CNT en Beniaján, urbeto de Mursjo, kaj la sidejo de la Revoluciaj Junuloj Komunistaj. Nun ni estas en konversacioj kun kelkaj framasonoj, kiuj intencas lerni nian lingvon en Arĉeno, apuda urbo al Mursjo.

De kiam mi ekprenis la taskon redakti nian bultenon, estis misfido al mi, vortumata dekomence de la antaŭa redaktoro, Antonjo Marko Botelja, kiam li diris al mi en Sankta Ĥavjero: "Mi ne dubas, ke tehnike vi plibonigos la aferon, sed mi zorgigas pri la enhavo!" Nun tiuj vortoj ne ŝajnas al mi tiom naivaj kaj spontanaj, kiel tiam. Mi memoras, ke mi ridetis al la verŝajna ŝerco de kamarado Marko. Tamen…, post ĉio, kio okazis de tiam, mi demandas min, ĉu konversacioj pri tiu afero estis okazintaj, ĉu temis nur pri troigo aŭ "neanstataŭebla" manio de la eksredaktoro.

De kiam mi komencis la redaktadon, mi konstatis, ke ĝis tiam ne ĉiuj povis publikigi sian penson en la bulteno de HALE: eĉ la prezidanto mem, Marteno Bustin' Benito, sendis artikolon al la antaŭa redaktoro, kaj li rifuzis ilin pro diversaj kialoj. Mi trovis, ke tio estas esence maltolerema kaj dubinde demokrata: fakte, se la Prezidanto ne povas publikigi artikolon, kiu povus? Kaj tio prenis min al pli baza demando: kies estas la bulteno? Ĉu de la redaktoro? Ne en mia kazo, kompreneble. Mi komprenis ek de la momento, kiam mi konsentis preni la taskon, ke la magazino apartenas al ĉiu HALEano, kaj pro tio, ĉiu ano de nia asocio havas la rajton *denaskan* –se mi povas nomi tiel la momenton, kiam li aŭ ŝi aliĝas nian asocion—publikigi sian penson en ***Kajeroj el la Sudo***. Aldone, mi opinias, ke la Prezidanto havas ion diri al la anoj de la asocio ĉiam, aŭ li aŭ ŝi ne estas bona prezidanto. Povas esti manio aŭ miskompreno mia, sed laŭ mi la vortoj de la Prezidanto oficialigas la bultenon, kaj inverse. Mi ne komprenis, ke la prezidanto, tiam Marteno Bustin' Benito, ne komprenis

tion, kaj konsideris la aferon devo kaj pezo, ne ŝanco komuniki kun la tuta asocio. De tiu momento, la prezidanto havis liberan forumon kaj aliron al ĉiu ano de la asocio. De tiam, la diversaj prezidantoj, kiujn ni havis, profitis la ŝancon komuniki la asocion pri niaj aferoj.

La unuaj kvar jaroj de mia redaktado pasis sen multe da peno, kaj mi provis fari la magazinon tiom variita kaj interesa, kiel mi povis. Sed je la jaro 1999 mi partoprenis la Kongreson de SAT en Karlovy Vary. Mi ne estis membro de SAT de 1994, kies antaŭan jaron mi eksigis pro tio, ke mi intencis publikigi artikolon kritikante naciisman eron de UEA en diversaj magazinoj, kiuj ne atentis pri tio, sed laŭ mi estis tro multe, kiam eĉ la bulteno de la Sennacieca Asocio Tutmonda ne interesiĝis pri la artikolo, kiu defendis sennaciismon kontraŭ tio, kion oni faris dum la Kongreso de UEA en Valensjo, je 1993. La artikolon publikigis, tre ŝminkita, Marko Botelja en “Kajeroj el la Sudo” numero 22 (*Sopiro al interna ideo*, pago 16).

Kiam mi estis en Karlovy Vary, mi aktive partoprenis la kongreson, kaj je la fino de la kongreso, parte pro la longaj konversacioj, kiujn mi havis kun Ivo Peyrault, mi realiĝis al SAT. Bedaŭrinde, ne multaj homoj estis kiel Ivo. Estis problemo tiam, mi memoras, ĉar la redaktoro de la bulteno “Liberecana ligilo” ne deziris daŭrigi la laboron, do oni devis elekti alian. Oni diris, ankaŭ, ke estas iu Jakvo Schram, kiu sin proponis por tiu posteno, sed li postulis kondiĉojn, kaj oni ne atentis al tio. Sciante ion pri kompostado da paĝoj, mi ofertis mian helpon, sed sciigante, ke mi ne estas ano de SAT, oni pro tio ne konsideris mian oferton, sed valensjanon Antonjon Sebrjan’ Ĥulja’ (hispane Antonio Cebrián Juliá) sinproponatan oni akceptis. Mi promesis helpi lin tiucele, kaj kiam mi revenis en mian hejmon mi sendis al li la ilojn necesajn por fari tion. Sed kelkaj monatoj poste, mi ricevis komunikon de Jakvo mem, dirante, ke li faros la bultenon. Mi esprimis mian proteston, ĉar la asembleo de SAT komisiis Antonjon por tio. Sed Antonjo mem diris al mi poste, ke li preferas tiun solvon, ankaŭ, kaj pro tio mi akceptis tion nur kiel provizoran solvon, ĝis la sekvinta kongreso de SAT en Nagykanisza.

Kiam mi estis en la hungara kongreso, mi renkontis Jakvon finfine. Ni du havintis abundan korespondadon de antaŭe, kaj ni parolis abunde kaj libere. Mi suspektis iom da sektismo en liaj vortoj, kaj por pli bone kompreni lin, mi memoras, ke en tiu sentegmenta drinkejeto mi demandis, ĉu li povus paroli kun mi, se mi estus faŝisto. Mi poste vidis, ke tian hipotezon estas danĝere, ke oni faru al homo tiom simpla kiel Jakvo: kelkaj homoj ne havas imagopovon distingi inter teorio, hipoteza kazo, kaj realo.

Poste, kamarado Ivo Peyrault mortis, kaj estis nova prezidanto de SAT. Mi neniam sciis bone pri tio, kio okazis en la Plenumkomitato, sed post kelkaj monatoj, Jakvo Schram iĝis la nova Prezidanto de SAT. La kazo de Jakvo memorigas al mi pri tiu de Lech Walesa, en Pollando: li estis bona klasbatalanto, li bone luktis kontraŭ maljusto, kaj kiam la lando jam estis sendependa, li iĝis la Prezidanto de sia lando. Bedaŭrinde, tranĉeoj ne estas bona universitato por regoscio, kaj post unu mandato, li ne plu venkis la balotadon. Sed SAT ne estas lando, kaj katastrofo ne havas tiom tujan sekvon. Do, estas ankoraŭ

homoj, multaj homoj, kiuj en SAT ne vidas, ke Jakvo reprezentas katastrofon por la asocio.

Alia grava ero en mia parolo estas, ke aperis en Hispanio nova asocio de SATanoj, fakte multaj, kiuj neniam estis en HALE kaj kelkaj, kiuj estis en nia asocio, kiel Marteno Bustin kaj Marko Botelja. Se oni esceptas la kazon de Marteno, oni povas aserti, ke ili neniam kontraŭstaris decidojn aŭ agojn de nia asocio, kaj ne serĉante pacon aŭ interkonsenton, ili fondis novan konkurencan asocion al tiu nia. Marteno komencis debaton, certe, sed ne celante trovi veron aŭ interkonsenton, sed tion, ke ni iru en lian ŝafarejon. Marteno ne agnoskas, ke li povas erari, aŭ ke oni povos eble konvinki lin, ke li eraras, do li, ekkomencante de la ideo, ke Nikolao Ŝil estis maljusta kaj nedeca, alvenis al la konkludo ke ni, atakitoj de Nikolao, kulpas. Kio estas kulpo nia? Nu, laŭ li, ke ni ne estas maldekstraj. Mi jam laciĝis memorigi, ke SAT –kaj HALE—ne estas partipolitika aŭ sindikatisma, sed nur kleriga asocio; sed el tio, ke en la dua linio de sia Statuto, oni asertas, ke SAT celas "a) utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda", oni eltiras, ke oni devas batali klase kontraŭ burĝoj. Aldone, el la frazo "ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la **dogmigon** de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj", je la dua paragrafo de la Statuto, el tiu longa frazo en la nuna SAT oni eltiras, ke oni estu komprenemaj kaj toleremaj al la ideoj de la klasbatalaj laboristaj partioj. Tamen, ne ekzistas apartaj klasbatalaj laboristaj partioj, krom anarĥiistoj kaj komunistoj aŭ socialistoj, kiuj ariĝas ĉirkau koncernaj partioj komunistaj kaj socialistaj. Tiu komprenemo signifas, praktike, ke oni jesu al la rimedoj de ili uzitaj por akiri povon, kaj malamo al la rimedoj de aliaj partioj kaj ideoj. Pro tio, kiam mi venis laste en SATn, dum la jaro 2004, kaj provis defendi liberpenson kaj liberesprimon en la sino de SAT, mi trovis neniun apogon kaj multe da moko kaj kritiko, eĉ se kelkaj SATanoj montris, ke ili aprobas kelkajn faktojn, de mi rezonitajn.

Kiam mi ankoraŭ ne estis en SAT, dum la jaro 2003, mi estis elektita kiel reprezentanto de HALE en la Ĝenerala Konsilantaro de SAT. Oni unue akceptis min, sed poste oni forpelis min de la diskuto listo tia de SAT kontraŭ la propra Statuto de SAT, ĉar oni diris, ke oni devas esti ano de SAT por esti en tiu Konsilantaro. Tamen, la Statuto ne tion diras. La Prezidanto de SAT faris tion kontraŭstatute, esperante, ke en la veninta kongreso, en Ŝodefon', Svisio, oni pravigus lin. Verŝajne tio okazis en la asembleo, sed ili ĉiuj forgesis, ke ŝangi eĉ unu eron el la Statuto de SAT postulas referendumon, kaj asembleo ne estas referendumo.


Post kelkaj monatoj de diskutoj, mi venis en SATn denove, plejparte pro la insisto de nia Prezidanto de HALE reguligi nian situacion. Sed tio jam estis malfrue: La "Asociación Izquierda y Esperanto SAT en Hispanio", malgraŭ sia titola konfeso pri politiko (Asocio Maldekstro kaj Esperanto SAT en Hispanio) estis agnoskata kiel LEAo en la kongreso de

Nagykanisza, anstataŭante tiel nian asocion. Kelkaj monatoj antaŭ tio, ni estis komunikataj, ke ni ne plu estas en la LEA-komitato de SAT. Verŝajne SAT decidis, ke ni havis nenion diri pri tio, kaj oni povas kondamni asocion kaj homojn sen aŭskulti ilin antaŭe. Ili taksas nian proteston, ke ili agis inkvizicieske, insulta, sed la insulto devus esti por Inkvizicio, ĉar eĉ la Inkvizicio aŭskultis la kulpiton antaŭ kondamnis ili.

Post unu jaro da senĉesaj diskutoj kun elstaraj SATanoj en SAT-diskuto, diskuto listo por anoj de SAT (http://fr.groups.yahoo.com/group/SAT-diskuto/), mi rimarkas, ke estas neeble rezonigi kelkajn homojn ekster ilia politika kredo, kaj se mankas al ili argumentoj, ili ne rifuzas mokon, ridindigon aŭ rektan insulton.

Mi provis skizi la gravajn aferojn, kiujn travivis nia asocio laste, kamaradoj, kaj se ankoraŭ oni ne vidis mian ĉefan argumenton resti en SAT, mi klarigas ĝin nun:

SAT estas nun en la manoj de kontraŭ-SATaj homoj. En SAT nun regas la penso, ke ili estas batalantoj por pli bona mondo,



Mahatma Gandhi forpelis, per sia neperforta agado, la Imperion de sia lando.

kaj oni batalas klase kaj per eksmodaj rimedoj perfortaj, fifamigaj, mensogaj, povaj. Tia SAT ne devas ekzisti. Mi konsideras, ke la sola spirito de la originala SAT, de tiu SAT, kiu vere pluvivos tiun ĉi situacion, estas HALE mem. Ni ne estas partipolitikaj, tamen ni estas kontraŭ maljusteco kaj perforto, ni estas por libera penso kaj libera esprimado. **Pervorto, ne perforto**. **Sinklerigo, sinpostulo**, estu niaj armiloj. Ni estas kontraŭ aŭtoritatismo, ni estas kontraŭ diktatoreco, same kiel ni ĉiam estis. Ni ne estas kontraŭ aliaj ideoj, kiujn ni ne havas, ĉar ni kredas, ke tiuj niaj estas plej bonaj. Tamen, ni ne neas, ke ni povas trovi pli bonajn ideojn, kaj sekve ni igos ilin niaj. Sed ni estas konvinkitaj, ke se perforto kaj arbitracio devas esti for de nia mondo, unue ili estu for de nia asocio. Tiun etan detalon ankoraŭ oni pretervidas en SAT. Tie oni anstataŭas LEAon pro tio, ke ili deziras havi unikan penson, kiu ebligu ilin aktivi politike, laŭ tio, kio la Plenumkomitato de SAT diras, ke ili havas **politikan direkton mallarĝe difineblan kiel *klasbatalan* kaj pli larĝe kiel *maldekstran*** Ili eĉ asertas, ke **Tiun politikan karakteron la statuto atribuas al SAT** kaj ke **SAT perdos ĉian politikan agadkapablon** se oni igas la asocion malferma al ĉiuj tendencoj. Mi opinias, ke tie la Plenumkomitato de SAT eraras tragike. Tragike, ĉar tio signifas la malapero de SAT. Frue aŭ malfrue, sed nepre tio venos. Pro tio mi defendas restadon ce SAT.

Rilatojn oni perdas kiam unu parto el du foriras. Ni ankaŭ povas foriri kaj defendi, ke ni havas nenion komunan al SAT. Sed mia opcio, tio, kion mi defendas antaŭ vi, kamaradoj, estas iri nenien, sed resti tie,

kie ni ĉiam estis. Ni ne estis dekstro, sed ni ne estis maldekstro. Pro tio oni manipulaciis kaj manipulacias kontraŭ ni, pro tio oni mensogas kaj fifamigas kontraŭ ni. Pro tio, ni devas elteni tiun ĉi maldolĉan momenton, kaj atendi. Ĉar ni, samideanoj, estas la esenco de SAT. La esenco, kiun la Plenumkomitato ne trovas amika aŭ eĉ trovas fremda. Kaj kiam SAT finfine malaperos, SAT pluvivos, ĉar ni ekzistos.

Pro tio mi petas vin, ke vi voĉdonu por rezisto al perforto kaj malamikeco de la nuna Plenumkomitato de SAT, kaj atendu ĝis kiam ĝi sanĝos, por ke SAT ne malaperu.

*Jesuo de las Heras*

## Postkrizo kaj starigo de aliancoj

Pasis jam sufiĉaj monatoj ekde la konkludo de la Unua Virtuala Kongreso




de HALE kaj la tujposta kaj maljusta eksigo de nia asocio, kiel LEAo de SAT, kontraŭstatute kaj surbaze de falsaj kulpigoj de faŝismo –neniam pruvitaj kaj nepruveblaj—. Devigite de la stranga kaj ridinda rezolucio de SAT oni prokrastis la ekaplikon de la kongresaj konkludoj por kontraŭstari la fifamigan kampanjon kontraŭ ni kaj nuligi la eksigon. Post intensa baraktado oni nek sukcesis atingi revokon de la eksiga decido nek punon por Jakvo Ŝram kiel prevarikinton de la Statuto de SAT. Nu, sufiĉu leki niajn vundojn kaj ni ekzamenu la realon kaj niajn eblajn strategiojn. La situacio estas la jene absurda: Dum HALE ne plu estas konsiderata kiel LEAo de SAT kaj ties ĉi plenumkomitato petis al la SATanaro ne havi iajn ajn rilatojn kun "tia faŝisma asocio", okazas, ke sufiĉe nombra kvanto de HALEanoj plu ĝuas plenrajtecon kiel individuaj membroj de SAT; bone sciante la Plenumkomitato, ke ili apartenas al HALE –INTER ILI Jesuo de las Heras kaj mi mem—sed neniam ili obĵetintas nian duoblan anecon. Aldone tion ĉi, la anstataŭintoj de HALE, t.e. SATEH, realigas taskojn kaj faras politikajn kontaktojn tiajn kiel ili povintus fari kiel HALEanoj —sen ia ajn obĵeto niaflanka (ekzemple, starigi budon informan kadre de la festo ĉiujara de la Komunisma Partio de Hispanio)-; kiucele, do la interesperantista milito? Nepras kaj urĝas potlasi la pravajn rankorojn, la sintenojn senpotencajn kaj la elreviĝojn. Necesas ŝanĝo de aliancoj kaj ekagi por plenumi niajn kulturajn, demokratajn kaj progresemajn celojn. Ni ekapliku la konkludojn de la Virtuala Kongreso.

Konstatinte, ke ene de SAT estas ankoraŭ grava nombro de kamaradoj kiuj, ekde diversaj politikaj sintenoj, koincidas kun HALE je niaj sopiroj al interna kaj pli tolerema etoso, al mondo en paco, sen imperiismoj ŝtataj, klasaj aŭ lingvaj kaj al universala rispektemo pri la homaj rajtoj; la estraro de HALE pere de siaj membroj SATanaj devas starigi kontaktojn kun tiuj E-civitatanoj, humanistaj frakcianoj, vegetaranoj, neperfortemuloj, liberpensuloj, sufiĉaj komunistoj kaj socialistoj, por, se eble, radikale ŝanĝi SATn, kaj se tio malsukcesus, oni esploru kun ili la ŝancon krei novan organizaĵon progreseman, demokratian, esperantistan kaj politike plurecan, sen cenzuro en sia presorgano (male de "Sennaciulo") kaj ne praktikanta la kalumniojn por gajni internan povon.

Due, aŭ samtempe de la dirito, la estraro de HALE devas rekte kontakti kun grupoj esperantistaj aŭ favoraj al la universaligo de Esperanto, kiel FLE (Flandra Ligo Esperantista), kiu antaŭ nelonge forlasis SATon; la Partio Radikala Transnacia kaj ERA (Esperanto Radikala Asocio) por interŝanĝo de opinioj kaj kunlaboraj akordoj pri niaj komunaj celoj (ekzemple: Esperanto en Eŭropa Unuiĝo, referendumoj por la Eŭropa Konstitucio, ktp).

Resume, por ne tro plilongigi la tekston, mi citos pecon tradukitan el la hispana el la parolado de S-ro Paŭlo Iglesias (fondinto de PSOE) kun dato de 6-a de decembro de 1901, kaj esprimanta miajn dezirojn por HALE kaj SAT:

*Ĉiu konscia laboristo, ĉiu proleto kiu sopiras vidi sian klason leviĝi kaj penadas por finigi la ekspluatadon kiun ĝi suferas, devas serĉi la forton por si mem kaj siaj kamaradoj en organizaĵo serioza, kie regu la solidareco, ĉiuj havu la samajn strebojn kaj ke la forto kreata montriĝadu laŭ la postuloj de la cirkonstancoj.*

***Jozefo Pina Tuells***

# Kune danci[1]

*tradukite de Karlo Martínez*

Danci de malproksime ne estas danci
Estas kiel dancante sola
Ci dancas en cia vulkano
Kaj du metroj de ci
Mi dancas en la polo.

Provo sole unufoje
Kune danci kiel la fajro
Brakumoj la ritmon
Sen apartigi iam
Cia korpon de mia korpo.

Kune danci estas danci
Kiel la maro dancas kun la delfenoj
Koro kun koro en sole unu balejo
Du dancistoj.

Tre brakumoj ambaŭ
Karesante ni
Sentante ni la pelton
Nia balado sonos
Provos
Provi la arto de flugi

Kune danci estas danci
Kune danci estas danci
Estas danci.

[1]Kantata hispane de Serĥjo Dalma

# La Faraono

## ĈAPITRO 13-a

La ekskursoj de la kronprinco, entreprenitaj por trovi la pastron, kiu savis Saran kaj donis al li juran konsilon, havis neatenditan rezultaton.

La pastro ne estis trovita, sed inter la egiptaj kamparanoj komencis rondiri legendoj pri Ramzes.

Homo veturis vespere de vilaĝo al vilaĝo en malgranda ŝipeto kaj rakontis al la kamparanoj, ke la kronprinco liberigis la homojn, kiujn minacis minlaboro, kiel puno pro la atako kontraŭ lian domon. Krom tio li batis la oficiston, kiu volis superforte preni de ili maljustan imposton. La fremdulo aldonis fine, ke Ramzes estas speciale protektata de la dio de la okcidenta dezerto, Amon, kiu estas lia patro.

La simpluloj avide aŭskultis la rakontojn, unue ĉar ili estis tute konformaj al la faktoj, due ĉar la rakontanto mem havis aspekton de spirito: li venadis oni ne scias de kie kaj malaperadis.

La princo Ramzes tute ne parolis pri siaj kamparanoj kun Dagon, eĉ ne alvokis lin. Li sentus honton en la ĉeesto de la feniciano, de kiu li prenis monon kaj de kiu li ankoraŭ multfoje eble postulos ĝin.

Sed kelke da tagoj post la aventuro kun la skribisto de Dagon, la bankiero mem vizitis la princon, tenante ion kovritan en la mano. Enirinte en la ĉambron de l' kronprinco, li ekgenuis, malligis la blankan tukon kaj prenis el ĝi belegan oran pokalon. Ĉi estis inkrustita per diverskoloraj ŝtonoj kaj kovrita per plata skulptaĵo, kiu prezentis sur la piedo de l' pokalo kolektadon kaj premegadon de l' vinberoj, kaj sur la pokalo mem festenon.

—Akceptu ĉi tiun pokalon, alta sinjoro, de via sklavo— diris la bankiero —kaj uzu ĝin cent... mil... jarojn ĝis la fino de la jarcentoj.

Sed la princo komprenis, kion celis la feniciano. Ne tuŝante do la oran donacon, li diris kun severa mieno:

—Ĉu vi vidas, Dagon, la purpurajn rebrilojn en la interno de la pokalo?

—Vere— respondis la bankiero —kiel mi povus ne vidi ĉi tiun purpuron, kiu pruvas, ke la pokalo estas el plej pura oro.

—Kaj mi diros al vi, ke tio estas la sango de l' infanoj, kiujn oni forprenis de l' gepatroj— respondis kolere la kronprinco.

Li sin deturnis kaj foriris en pli malproksimajn ĉambrojn.

—Ho Astoret! - ĝemis la feniciano.

Liaj lipoj bluiĝis, kaj liaj manoj komencis tremi tiel forte, ke li apenaŭ povis envolvi la pokalon en la blankan tukon.

Post kelke da tagoj Dagon venis kun sia pokalo en la bienon de Sara. Li havis vestojn, broditajn per oro, en la densa barbo li havis vitran globeton, el kiu fluis parfumoj, kaj sur la kapo li fiksis du plumojn.

—Bela Sara— komencis li —verŝu Jehovo sur vian familion tiom da benoj, kiom da akvo fluas en Nilo. Ni fenicianoj kaj vi, Hebreoj, estas ja najbaroj kaj fratoj. Kaj mi brulas de tia amo al vi, ke se vi ne apartenus al nia plej nobla sinjoro, mi oferus por vin havi al Gedeono (li fartu bone!) dek talentojn kaj mi prenus vin kiel leĝan edzinon. Tiel pasia mi estas!...

—Dio gardu min - respondis Sara— ke mi bezonu havi alian sinjoron, ol la mia. Sed kiel, bona Dagon, venis al vi la deziro viziti hodiaŭ la servistinon de l' sinjoro?

—Mi diros al vi la veron kvazaŭ vi estus Tamara mia edzino, kiu kvankam ŝi estas filino de Sidono kaj alportis al mi grandan doton, estas jam maljuna kaj ne indas demeti al vi la sandalojn.

—En la mielo, kiu fluas el via buŝo estas multe da absinto— interrompis Sara.

—La mie1o— diris Dagon sidiĝante —estu por vi, kaj la absinto venenu mian koron.

Nia sinjoro, la princo Ramzes (li vivu eterne!) havas leonan buŝon kaj vulturan ruzecon. Li bonvolis ludoni al mi siajn bienojn, kaj tio plenigis mian stomakon per ĝojo; sed li ne konfidas al mi, tiel ke de ĉagreno mi ne dormas tutajn noktojn kaj nur ĝemas kaj per larmoj surverŝas mian liton, en kiu, se vi, Sara, kuŝus kun mi anstataŭ Tamara, kiu ne povas plu veki dezirojn en mi...

—Ne pri tio vi volis paroli— interrompis Sara ruĝiĝinte.

—Mi ne scias plu, kion mi volas diri de l' tempo, kiam mi ekvidis vin kaj de l' tago, kiam nia sinjoro, sekrete observante miajn agojn en la bieno, batis per bastono kaj forprenis la sanon de mia skribisto, kiu kolektis de l' kamparanoj la impostojn. Ĉi tiu imposto ja ne estas por mi, Sara, sed por nia sinjoro... Ne mi ja manĝos figojn kaj tritikajn panojn el ĉi tiu bieno, sed vi, Sara, kaj nia sinjoro... Mi ja donis monon al nia sinjoro kaj juvelojn al vi, kial do la malnoblaj egiptaj kamparanoj devas malriĉigi nian sinjoron kaj vin, Sara?.. Por ke vi komprenu, kiel forte vi boligas mian sangon, kaj por ke vi eksciu, ke mi volas havi nenion el tiuj bienoj, sed ke mi donas al vi ĉion, prenu, Sara, ĉi tiun oran pokalon, inkrustitan per ŝtonoj kaj kovritan per skulptaĵoj, kiun admirus la dioj mem...

Dirante ĉi tion Dagon eltiris el la tuko la pokalon, kiun ne akceptis la princo.

—Mi eĉ ne volas, Sara - daŭrigis li, - ke vi havu ĉi tiun pokalon en via hejmo kaj donu el ĝi trinki al nia sinjoro. Vi transdonu ĉi tiun pure oran pokalon al via patro, Gedeono, kiun mi amas, kiel fraton. Kaj vi diru, Sara, al via patro sekvantajn vortojn: » Dagon, via dunaskito, malfeliĉa luanto de la bienoj de la kronprinco estas ruinigita. Trinku do, patro, el ĉi tiu pokalo, kaj pensu pri via dunaskito Dagon kaj petu Jehovon, ke nia sinjoro, la princo Ramzes, ne batu liajn skribistojn kaj ne ribeligu la kamparanojn, kiuj jam sen tio ne volas pagi. Kaj vi, Sara, sciu, ke se vi allasus min al intimeco kun vi; mi donus al vi du talentojn, kaj al via patro unu talenton, kaj mi hontus, ke mi donas tiel malmulte, ĉar vi indas la karesojn de la faraono mem, kaj de la kronprinco, kaj de lia ekscelenco la ministro Herhor, kaj de la brava Nitager kaj de la plej riĉaj feniciaj bankieroj. Vi estas tiel bongusta, ke kiam mi vidas vin, mi svenas kaj kiam mi ne vidas vin, mi fermas la okulojn kaj lekas la fingrojn. Vi estas pli dolĉa ol la figoj, pli bonodora ol la rozoj... Mi donus al vi kvin talentojn... Prenu la pokalon, Sara....

Sara sin deturnis kun mallevitaj okuloj.

—Mi ne prenos la pokalon— respondis ŝi — ĉar mia sinjoro malpermesis al mi akcepti donacojn de iu ajn.

Dagon ŝtoniĝis de mirego kaj rigardis ŝin per larĝe malfermitaj okuloj.

- Vi do ne scias, Sara, kiom valoras ĉi tiu pokalo?... Cetere mi donas ĝin al via patro, mia frato...

- Mi ne povas akcepti... - murmuretis Sara.

- Sensencaĵo!... - ekkriis Dagon. - Vi, Sara, pagos al mi por ĉi tiu pokalo alimaniere, dirante nenion al via sinjoro... Virino tiel bela kiel vi devas ja posedi oron kaj juvelojn kaj devas havi sian bankieron, kiu liverus al ŝi monon, kiam ŝi ekdeziros, kaj ne nur tiom, kiom volos ŝia sinjoro?...

- Mi ne povas!... - murmuretis Sara, ne kaŝante abomenon al Dagon.

La feniciano tuj ŝanĝis la tonon kaj diris ridante:

- Tre bone, Sara!... Mi nur volis konvinkiĝi, ĉu vi estas fidela al nia sinjoro. Kaj mi vidas, ke vi estas fidela, kvankam malsaĝaj homoj babilas...

- Kion?... eksplodis Sara, sin ĵetante al Dagon kun kunpremitaj pugnoj.

- Ha, ha! - ridis la feniciano. - Kia domaĝo, ke tion ne aŭdis kaj ne vidis nia sinjoro... Sed mi iam rakontos al li, kiam li estos favora al mi, ke vi ne nur estas fidela al li kiel hundo, sed eĉ ne volis akcepti oran pokalon, ĉar li malpermesis al vi akcepti donacojn... kaj tiu pokalo, kredu,

Sara, al mi, sukcese tentis pli ol unu virinon... kaj ne malgrandan virinon...

Dagon restis ankoraŭ kelke da minutoj, admirante la virton kaj obeemon de Sara, fine li tre amike adiaŭis ŝin, eniris en sian ŝipeton kun tendo kaj forveturis Memfison. Kaj kiam la domo de Sara malaperis post la arboj, Dagon leviĝis kaj etendinte supren la manojn komencis krii:

- Ho Baal, Sidon, ho Astoret!... venĝu al la malbenita filino de Judo mian ofendon... Pereu ŝia perfida beleco, kiel guto da pluvo en la dezerto!... Manĝu ŝian korpon la malsanoj, kaj la frenezo ekposedu ŝian animon!... Elpelu ŝin la sinjoro el la domo, kiel favan porkon!... Kaj kiel hodiaŭ ŝi forpuŝis mian pokalon, tiel venu tempo, en kiu oni forpuŝos ŝian sekan manon, kiam ŝi soifanta almozpetos glason da ŝlima akvo...

Poste li kraĉis kaj murmuris nekompreneblajn, sed tiel terurajn vortojn, ke dum unu momento nigra nubo kovris la sunon kaj la akvo apud la ŝipeto komencis malklariĝi kaj ŝveli en grandajn ondojn. Kiam li finis, ree ekbrilis la suno, sed la rivero ankoraŭ furioze ondis, kvazaŭ movata de nova alfluo.

La remistoj de Dagon ektimis kaj ĉesis kanti; sed apartigitaj de sia sinjoro per la tendo, ili ne vidis liajn procedojn.

De tiu tago la feniciano ne montris sin plu ĉe la kronprinco. Sed kiam foje la kronprinco venis en sian domon, li trovis en sia dormoĉambro belan deksesjaran fenician dancistinon, kies tuta kostumo konsistis el ora ringo sur la kapo kaj el tuko delikata, kiel aranea punto, sur la ŝultroj.

- Kiu vi estas? - demandis la princo.

- Mi estas pastrino kaj via servantino; sendis min Dagon, por ke mi forpelu vian koleron kontraŭ li.

- Kiel vi povas tion fari?

- Jen tiel... sidiĝu ĉi tie - diris ŝi sidigante lin sur la apogseĝo - mi stariĝos sur la fingroj por fariĝi pli alta ol via kolero kaj per ĉi tiu tuko, kiu estas sanktigita, mi forpelos malproksimen de vi la malbonajn spiritojn... For, for - murmuretis ŝi, dancante ĉirkaŭ Ramzes. - Forprenu miaj manoj de viaj haroj la malgajecon... miaj kisoj redonu serenan rigardon al viaj okuloj... la batado de mia koro plenigu per muziko viajn orelojn, sinjoro de Egipto... For, for!... Li ne estas via, sed mia. La amo bezonas tian silenton, ke en ĝia ĉeesto eĉ la kolero devas kunpremi la lipojn.

Dancante ŝi ludis kun la haroj de Ramzes, ĉirkaŭprenis lian kolon, kisis liajn okulojn. Fine laca ŝi sidiĝis ĉe la piedoj de l' princo kaj apoginte la kapon sur liaj genuoj, ŝi fikse lin rigardis, spiregante per la duone malfermita buŝo.

- Vi ne koleras plu kontraŭ via servisto Dagon?... - murmuretis ŝi, karesante la vizaĝon de l' princo.

Ramzes volis kisi ŝin je la buŝo, sed ŝi salte leviĝis de liaj genuoj kaj forkuris kriante:

- Ho ne, malpermesite estas ...

- Kial?

- Mi estas virgulino kaj pastrino de la granda Astarte... Vi devus tre ami kaj honori mian protektantinon, antaŭ kiam estus permesite al vi min kisi.

- Kaj al vi estas permesite?...

- Al mi ĉio estas permesita, ĉar mi estas pastrino kaj mi ĵuris resti virga.

- Por kio do vi venis?

- Dispeli vian koleron. Mi tion faris kaj mi foriras. Fartu bone kaj ĉiam restu bona!... - diris ŝi kun penetranta rigardo.

- Kie vi loĝas?... Kiel oni nomas vin?... - demandis la princo.

- Mia nomo estas Kareso, kaj mi loĝas... por kio tion diri. Ne baldaŭ ankoraŭ vi venos al mi.

Ŝi adiaŭis lin per la mano kaj malaperis; la princo duone sveninta ne forlasis la seĝon. Kiam post momento li elrigardis tra la fenestro, li ekvidis riĉan portilon, kiun kvar Nubianoj rapide portis al Nilo.

Ramzes ne bedaŭris, ke ŝi foriris: ŝi mirigis lin, sed ne ravis.

- Sara estas pli kvieta ol ŝi - pensis li - kaj pli bela. Cetere... ŝajnas al mi, ke ĉi tiu fenicianino devas esti malvarma, kaj ŝiaj karesoj lernitaj.

Sed de tiu ĉi momento la princo ĉesis koleri kontraŭ Dagon, tiom pli, ke kiam li foje estis ĉe Sara, venis al li liaj kamparanoj kaj dankante pro la protekto, anoncis ke la feniciano ne devigas ilin pagi novajn impostojn.

Tiel estis apud Memfiso. Kontraŭe en aliaj bienoj la luanto de l' princo kompensis siajn perdojn.


La movado havis SEMAJNON
... ĝi kostis 208 eŭrojn
... ĝi aperis unu semajnon
La movado havas MONATON
... ĝi kostas nur 44 eŭrojn*
... ĝi aperadas jam 25 jarojn
La movado havos MONATON
... dum la movado abonas ĝin
... MONATO bezonas pli da movado
VI ESTAS LA MOVADO
... Vi bezonas MONATON
... MONATO bezonas Vin
MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, moderna vivo, scienco, kulturo kaj multe p
Petu provnumeron de MONATO,
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio,
aŭ prefere de monato@fel.esperanto.be
Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA
*En difinitaj landoj la prezo povas esti alia. Petu informojn de monato@fel.esperanto.be

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO Tfnº (00 34) 658 166 323

Retskribu al jesuo@ono.com

http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k64.htm

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k64.htm




Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.

ISSN 1697-6460